

DAŬRIPOVA EVOLUO

en la informado pri esperanto

Konsciigo—kiucele?

- * Montri ke Esperanto estas aktuala temo, parto de la nuntempa mondo
- * Tuŝi la sentojn de la homoj, elvoki komunajn valorojn
- * Fari ligojn inter la lernado kaj uzado de Esperanto kaj aliaj vivprioritatoj
- * Eduki la homojn al pli kritika kaj vasta rigardo al lingvoj kaj lingvaj demandoj

Siatempe...

- * **1900-1913**: Esperanto en vasta ondo de internaciaj kontaktoj, vojaĝado, idealismo
- * **1920-1933**: Esperanto en naciaj kaj internaciaj movadoj por egaleco, modernigo, socialismo
- * **1950-1989**: Esperanto en streboj por paca internacia ordo bazita sur homaj rajtoj
- * **1990-2013**: Esperanto en epoko de tutmondiĝo, disvastiĝo de interreto

Daŭripovo—kio estas tio?

- * Laŭ Unesko, evoluo al socioj kun jenaj trajtoj:
 - * paco kaj justeco
 - * demokratio
 - * naturprotektado
 - * ekonomio kiu servas homojn kaj naturon

Streboj al daŭripovo

* Asocioj kaj movadoj por...

- * justa traktado de enmigrintoj, kontraŭrasisma edukado, interkultura edukado, indiĝenaj rajtoj...
- * internacia juro, homaj rajtoj, libereco de esprimado, libera gazetaro, popola klerigo (ekz. pri scienco)...
- * naturprotektado, medikonscia edukado, ekologia agrikulturo, ŝparema vivstilo...
- * ekonomia egaleco, renovigebla energio, loka produktado, justa komerco...

Kio pri lingvoj?

- * Konscio pri lingvaj problemoj nur en unuopaj kazoj (ekz. indiĝenaj lingvoj, politikaj konfliktoj, enmigrintoj)
- * Manko de ligo inter lingvaj demandoj kaj aliaj sociaj streboj
- * Fido al teknologio, lernado de la angla; ofte, koncentriĝo al lokaj temoj kaj situacioj
- * Daŭra influo de unu- aŭ dulingvismo — “ĉiuj lernu lingvon X kaj la problemoj estos solvitaj”

Kernaj mesaĝoj

- * Daŭripova mondo estas multlingva mondo
(ni estas movado por justa multlingveco)
- * Daŭripova mondo estas interparolanta mondo
(ni estas movado por malferma komunikado)
- * Daŭripova mondo estas interkultura mondo
(ni estas movado por tutmondeca edukado)

Kelkaj demandoj

- * Ĉu la informiloj kaj retejoj de via landa asocio evidentigas, ke nia movado:
 - * estas multlingva kaj aprezas multlingvecon?
 - * subtenas komunikadon pri ĉiaj temoj, i.a. per tre diversaj retejoj, revuoj, renkontiĝoj?
 - * edukas homojn al interkultura kompreno kaj tutmondeca perspektivo?

Strategio por UEA

- * Komunaj informiloj pri Eo kaj daŭripova evoluo
- * Reto de aktivuloj pri Eo kaj daŭripova evoluo
- * Kapabliga (kleriga/trejna) programo pri Eo kaj daŭripova evoluo
- * Elekitaj celoj por ekstera/konsciiga agado (ekz. ĉe difinitaj NRO-j, ĉe UN kaj Unesko, en internaciaj konferencoj k.s.)

Pliaj demandoj

- * Pri kio vi plej multe ŝatus lerni/trejniĝi sur tiu kampo?
- * Kiuj celpublikoj ŝajnas al vi plej gravaj/promesplenaj, se temas pri via propra lando/medio?
- * Kion vi plej prioritare bezonas por povi ekagi sur tiu kampo?